



Internacia Komunista Esperantista Kolektivo

IKEK, BCM Box 8932, London GB-WC1N 3XX

Esperanto por la klasbatalo



ENKONDUKE ... DE STANO KEABLE

IKEK estas organizaĵo de komunistoj kiuj parolas la internacian lingvon Esperanto kaj utiligas ĝin por la klasbatalo de la laboristaro por senklasa komunisma socio.

Ni celas interrilatigi la komunistajn esperantistojn, kaj helpi al la internaciaj rilatoj de la komunistaj kaj klasbatalantaj partioj kaj de la laborista movado.

Al la klaskonsciaj gelaboristoj ni proponas subtenon kaj utiligon de Esperanto kiel demokrata kaj praktika rimedo en la lukto por monda unueco de nia klaso.

La progresemajn esperantistojn ni vokas al subteno de la lukto de la laboristaro. Nur la monda laborista klaso, bone organizita kun demokrata politika programo, kapablas gvidi la homaron preter la kontraŭ-homa infero, kiun alportas la kapitalismo.

ALIĜU

Ĉu vi estas politika maldekstrulo kiu scipovas la internacian lingvon? Do, ni invitas vin fariĝi membro de nia klasbatalema organizaĵo. Kvankam IKEK povas demokratie adopti difinitajn politikajn sintenojn, ĝi estas politike mult-tendenca: membroj ne devas konsenti. Membro devas akcepti la Statuton kaj pagi membrotizon. *Legu pli ĉe paĝoj 6-8.*

MEMBRO-ORGANIZANTO

Kamarado **Alcino Ramos Alves** el Portugalio, kiu jam delonge surpostenis kiel Kasisto, en Septembro akceptis aldonan respondecon prizorgi la oficialan membroliston de IKEK.

Grava tasko, kontroli kiu rajtas voĉdoni - ĉu ĉe eventuala konferenco, ĉu en antaŭ-konferenca baloto por elekti estontan estraron.

MASTRUMANTO

Dank' al rapida kaj kompetenta laboro lastatempe far K-do **Jurij Finkel** el Rusio, nia retpaĝaro (www.ikek.org) denove montras signojn de vivo, kaj jam pretas aperigi novajn artikolojn. Tie vi trovos ĝisdatigitajn informojn.

Artikoloj respegulas la opiniojn de la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendadas.

Kontribuojn sendu al la redaktoro de la retpaĝaro, Stano Keable:
keablestan@yahoo.co.uk



INTERNACIISTO INTERROMPITA

Ekde Septembro 2015, la posteno de Redaktoro de *Internaciisto* restas vaka, kaj la estonteco de la revuo restos necerta, ĝis la estraro elektos novan Redaktoron kaj trovos taŭgan aranĝon por presado kaj distribuado.

Dum pli ol du jardeka redaktado, K-do **Luis Serrano Pérez** staris kuraĝe sur posteno, ĝis finfine, je Aŭgusto 2015, li abdikis kiel Redaktoro kaj je la komenco de Septembro decidis ankaŭ forlasi sian seĝon ĉe la estraro de IKEK. Ni dankas lin pro sia sindonema laboro, kio tenis nian standardon dum tre malforta periodo.

Intertempe, ni distribuas ĉi tiun informilon al abonantoj - per retpoŝto, se ni konas vian retadreson, per helika poŝto, se vi ne uzas retpoŝton.

KURSO PRI MARKSISMO

IKEK prezentas retan kurson de marksismo, kiun gvidas **Vilhelmo Lutermano** en respektiva Yahoo-grupo. En la rubriko *Kurso de marksismo* ĉe la retpaĝaro de IKEK, ni donas ĉiujn lernomaterialojn de la kurso, laŭmezure de ties iro.

Legu pli ĉe: <http://ikek.org/kurso>.

IKEK ĈE LA 100-A UNIVERSALA KONGRESO, LILLO 2015

Legeblas en ĉefpaĝo de El Popola Ĉinio raporto de K-do **Dieter Rooke** pri la Universala Kongreso de Esperanto en Lillo, Francio: http://www.espero.com.cn/2015-08/18/content_36333947.htm. Jen ĉerpita ero pri la komunista agado organizita de IKEK:

“Mi mem gvidis la kunvenon de nia komunista kolektivo. Ĉeestantoj rakontis pri la spertoj en la iama socialisma bloko aŭ pri la nuntempaj konfliktoj tra la mondo. La ĝenerala opinio estis, ke necesas ŝanĝo en la evoluo kaj solvi paco ĉiajn malkonsentojn.



Dieter Rooke en gvido de la kunsido de komunistoj dum la 100a UK, Lillo, 2015

“Ni petas ankaŭ de Loka Kongresa Komitato de la 102a UK, kiu okazos en Seulo [2017], ĉefurbo de la Korea Respubliko, inviti samideanojn de la Korea Popol-Demokratia Respubliko partopreni en tiu UK. Certe ankaŭ eblos proprainciate viziti ilin.”

“Sabate la tradicia Movado Foiro komenciĝis akurate, je vespera horo. Tabloj preskaŭ flugis tra la aero por kontentigi bezonojn de plej diversaj asocioj. Sur mia tablo staris busto de la revoluciulo Lenin, kaj ruĝa standardo kun martelo kaj serpo. Krome mi amase disdonis nian organon *Internaciisto*, la statuton de nia komunisma kolektivo, kaj la muzikaĵon *La Internacio* en la versio de Kaloĉajo. Ĉiu scivolema kongresano ricevis glumarkon kun surskribo: "Per Esperanto - por komunismo". Post du horoj kaj multaj interesaj konversacioj malpleniĝis mia tablo.”

KURSO PRI MARKSISMO

Vilhelmo skribis: “Kiel antaŭan frandaĵon [de la Kurso pri Marksismo] mi prezentas al vi tekston, kiun nia samkursano **Roland Schnell** antaŭ du monatoj sendis al mi en la germana, kaj kiu ja iel rilatas al nia kurso. Temas pri artikolo de la germana gazeto *Taz (Tageszeitung)*, kiun mi Esperantigis por vi:”

POLITIKA TEORIO EN USONO - NI PRODU ĜIN PER MARKSO

En Usono oni proklamas la revenon de Markso. La selula literaturisto Benjamin Kunkel heligas la blindajn makulojn de la novkejnismo.

“Nocioj ne estas firmaj, sed ili vivas en spaco kaj tempo. Esti marksisto signifas en ĉiu generacio kaj en ĉiu jardeko ion alian. Se io portis antaŭ si la etiketon de 'marksisto' en la pasintaj jaroj kiel memdifinon, tiam tio ofte signifis: Mia radikaleco estas antaŭ ĉio emfazo de diferenco: mi estas alia, ne apartenas al la

ĉefa tendenco. Mi fajfas pri la reala mondo kaj pri la normaluloj.

Almenaŭ mi havas la konsenton de tiuj, kiuj kundividas mian pensadon, do de miaj tri plej bonaj amikoj kaj de la publiko de ekspozici-malfermoj. La memkarakterizo kiel marksisto estis ofte tre ege malfacile distingebla de akademia elit-konduto.

En Usono en tiu ĉi frua somero oni proklamas la "revenon de Markso", ĉar juna generacio de intelektuloj malkovras la radikalan kritikon.

Ĉefaj argumentoj estas: La fondo de la maldekstra magazino 'Jacobin', la turniĝo de la grupo de kritikaj intelektuloj ĉirkaŭ la

revuo n+1 al la direkto de marksismo kaj precipe la nova libro de la stelula literaturisto Benjamin Kunkel, "Utopia or Bust".

La proklamo de tia renaskiĝo ankoraŭ ne nepre menciindas, ĉar ĝi estas regule proklamataj en la ritmo de kelkaj jaroj. Nur en la lastaj dudek jaro la reveno de Markso estis, se mi bone kalkulas, dufoje anoncita: en 1997 la New Yorker deklaris Markson la "venanta granda pensisto", kaj aliaj magazinoj sekvis. Ĉar la kapitalismo tiom furoras, oni tiam diris, ke venis nun la horo de sistemkritiko, kiu helpas kompreni tiun kapitalismon.

LA "PUBLIKAJ INTELEKTULOJ"

Dek jarojn poste, kiam la karto-domo de la tutmonda finanĉkapitalismo kolapsis, oni ree profetis la revenon de Markso — ĉi-foje ĉar oni ja devis kompreni, kial la kapitalismo, kiu ĵus ŝajnis ankoraŭ tiom vivanta, povis fariĝi "kaputismo". El ĉio ĉi sekvis nenio. Tio estis neniam pli ol felietona susurado en la folioj de la temp-spirito. Sed, kiu scias, eble ĉi-foje ĉio estas alia?

La eminentuloj de la hodiaŭa usona Marks-renaskiĝo estas aparte seriozaj homoj, kiel la menciita Benjamin Kunkel. Kunkel, 41-jara, estas de dek jaroj kvazaŭ la voĉo de generacio de tiuj, kiuj kiel iom senorientiĝaj Twenty- kaj Thirtysomethings trairis la nulajn jarojn, sed klopodis por fariĝi gravaj.

Ankaŭ apenaŭ dek jaroj per sia romano "Nedeciditaj" li zorgis por unu el la grandaj literaturaj sensacioj. Ĝia ĉeffiguro, Dwight Wilmerding, kiu sencele drivas tra la vivo, estas komika Holden-Caulfield-tipo de la jarmilŝanĝiĝo.

Kunkel mem, kiu verkis tiun amuzan karakterizon de tuta generacio inter "iel esti kontraŭ", konsumkapitalismo kaj Ecstasy-ebrio, poste fondiĝis en filozofian legadon kaj en mirige funditajn studojn de politika ekonomio.

Li kunfondis la maldekstran kulturrevuon n+1, partoprenas en verkado por la nova maldekstra politikgazeto Jacobin kaj evoluis al "publika intelektulo".

BRIDI LA EKONOMION

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis ĉe Verso lia nova libro "Utopia or Bust" — envere nur kolektaĵo de disaj eseoj kaj recenzegoj, kiuj precipe orientiĝas laŭ aliaj aŭtoroj: laŭ la krizteorio de David Harvey, la kapitalismo-analizo de Robert Brenner, la kulturmarksismo de Fredric Jameson. Ankaŭ kelkaj semajnoj Kunkel publikigis krome grandan, impresan kritikon pri "Capital in the 21st Century" de Thomas Piketty.

Kunkel intervenas do sur la centra kampo de la nuntempa diskuto (sur kampo, kiun la nuntempa marksismo longan tempon neglektis aŭ nur per fraze pritraktis), la ekonomio kaj ekonomia teorio. Kunkel konas la modelojn de la rivalaj skoloj, li prenas ilin serioze kaj pro tio ankaŭ kapablas precize trafi per sia kritiko.

Se oni volas krude (pro la mallonge: tro krude) resumi la situacion de la debato, al kiu Kunkel kritike — aŭ per aliaj vortoj: radikaleme — reagis, oni povus formuli jene: La financa kraŝo kolapsigis la intelektan hegemonion de la novliberalismo. Estiĝas nova postkejnza ĉeftendenco, kiu, kvankam ne hegemonie, tamen konkeras terenon.

Influjaj ekonomikistoj, de Joseph Stiglitz ĝis Paul Krugman kaj Thomas Piketty, stampas hodiaŭ la retorikon, kiuj konsideras la forlason de la kejnraj aranĝoj la esenca kaŭzo de la krizo kaj per tio — implicite kaj ofte ankaŭ eksplicite — instigas al la interpreto, ke oni devas reveni al la kejnza projekto, kaj per tio oni povus remeti la tutmondan ekonomion sur la vojon de prospero kaj samtempe fari ĝin pli justa.

INSPIRITA DE MARKSO

Kunkel ne simple rifuzas tian interpreton. La "marksismo" de lia bando tute ne asertas doktrine, ke socialreforma bridado (kaj per tio ankaŭ savo) de la kapitalisma merkatekonomio estas ekskludita. La novaj radikaluloj nomas sin mem ne "marksistaj", sed "marxish" ("marksaj"), kio celas pli malfermitan pozicion en la senco de "inspirita de Markso" aŭ "en la tradicio de la

marksa pensado" kaj distanciĝas de ortodoksa laŭlitera kredo je tekstoj. Iel "markseca".

Sed ĝuste tio ebligas al Kunkel indiki la dubindoj de la post- aŭ nov-kejnza proponoj, kaj la fundita ekonomia klareco, kiun li en la lasta jardeko lege akiris, donas al tiuj indikoj realan sencon. Kio do estas la pravaj kritikoj kontraŭ la novkejnza pensado?

Unue: La novliberalismo dankis sian triumfon en la sepdekaj jaroj al ekonomiaj ŝanĝiĝoj de la postmilita kapitalismo, nome al la "superakumulado" kaj la "subkonsumado". Profitkvotoj en la reala ekonomio malkreskis. Tio altigis la spekulon febron de la financ-ekonomio, ĉar kapitalposedantoj tiel esperis pli altajn renditojn.

La dua respondo al la streĉiĝintaj espero je renditoj estis la altigo de la realaj salajroj, sed tio ne povis alporti kontentigan solvon, ĉar ĝi nur akiris la troakumulad-krizon kaj subkonsumad-krizon: salajruloj, kiuj enspezis ankoraŭ malpli, povis konsumo ankoraŭ malpli. Tio, kio devis altigi la renditojn en la produktado, tio samtempe reduktis ilin.

LA KOLAPSO DE LA RENDITO

Kreskanta enŝuldiĝo de privataj mastrumoj ja bremsis tiun procezon, sed per la fatala fino, kiun ni ĉiuj konas, nome la puŝiĝo de la financa sektoro kaj ĝeneralan troŝuldiĝon. Al la eksceso de ŝuldoj kontraŭstaras la eksceso de ŝparaĵoj (de la riĉuloj kaj riĉeguloj), kaj ambaŭ havas komunan kaŭzon: laboron ne sufiĉe pagatan [pagatan sub sia valoro].

Tiu fazo estas karakterizita per malalta kresko kaj pli granda malegaleco de la distribuado, kaj tiu interrilato ne estas hazarda. Ekzistas bonaj kialoj por supozi, ke la malegaleca distribuado estas esenca kaŭzo de la malalta kresko.

Kvankam Kunkel tre aprezas la empirian studaĵon de Thomas Piketty pri la kreskanta malegaleco, li tamen tre kritikas la mankon de ĉia teoria kadro. Se la kapitalrendito konstante troviĝas super la kreskokvoto (kaj tio estas la kerno de la "leĝo" prezentita de Piketty), tiam el tio, laŭ

li, devige sekvas, ke ĉe unu flanko estas ĉiam pli da kapitalo, kiu serĉas renditon kaj estas en la mano de privatuloj, kaj ĉe la alia flanko ĉiam malpli da konsumebla enspezo de normalaj ĝecivitanoj.

Pro tio logike io okazos la punkto, en kiu la kresko de rendito kolapsas, do la kresko de rendito transformiĝos en malkresko de rendito. Oni rajtas interpreti Kunkel-on tiel, ke povas esti, por ĉion ĉi kompreni, oni estas kun la argumentoj de Markso pri la tendenca falo de la profitkvoto tamen ĉe la pli sekura flanko ol ĉe la empirismo de Piketty. Oni povus diri ankaŭ jene: Kie Piketty laŭspuras la malsanojn de nia ekonomia sistemo, tie Kunkel laŭ malnova marksa metodo serĉas ties "kontraŭdirojn", la krizajn spiralojn, el kiuj eliro ne ekzistas.

REVOLUCIO ESTAS PLI REALISMA

Eble en pli kaj pli statanta mondo sen grandaj kreskokvotoj kun samtempa troŝuldiĝo de ĉiuj ekonomiaj subjektoj — ŝtatoj, privataj mastrumoj, bankoj — la kejnza alternativo jam ne ekzistas. Do: Kion, se Kejnzo jam ne funkcias? Nu, tiam ni provu Markson!

Ĉe sia tuta kritiko de la nova novkejnza ĉeftendenco — kaj Kunkel metas la fingron precize sur la blindan makulon de tiu politikekonomia skolo — li estas kompreneble mem duona kejnziano. Iu, kiu metas la ĝustajn demandojn, kiu tiam tamen mem formulas, "tutmonda prospero revenos nur kun la evoluo de socioj, en kiuj la homoj kapablas konsumi tion, kion ili produktas, kaj en kiu ili per sia laborforto produktas pli" — aŭ, per aliaj vortoj, kiel regas kondiĉo de "plendungeco". Sed tio estas, permesu al mi diri, pura kejnzismo.

La pravaj demandoj, kiujn Kunkel metas, estas ja integreblaj en la kejnzan modelon. Miksaĵo el tutmondaj fortranĉoj de ŝuldoj, masiva alidistribuado, grava kresko de salajroj kaj publikaj disponoj de laborestigo, kiuj kreas plendungecon, tio ja povus eble restartigi la ekonomian motoron, ĵus antaŭ ĝia definitiva rompiĝo, kiu scias?

Sed la dua demando — apud la unua, ĉu tio entute estas ankoraŭ ekonomie ebla — estas la demando pri tio, ĉu tio estas politike realigebla. Pri la propono de Piketty

organizi tutmondan impostadon de riĉaĵoj Kunkel prave skribas: "Kiel eblus, ke la afergvidantaj organoj de la reganta klaso en ĉiuj landoj tra la tuta terglobo komune decidus enkonduki masivan impostadon de ĝuste tiu klaso?" Kaj li aldonas sarkasme: "Sincere dirite, kompare al tio, eĉ la socialisma revolucio estas pli realisma."

IRONIO KAJ FAKTA SCIO

En certa rilato ankaŭ la marksismo de Kunkel estas variaĵo de la "katastrofo-marksismo", do de la konvinko, ke "normalaj" solvoj en la kadro de la sistemo ekonomie eble ne ekzistas, kaj se ili tamen ekzistas, estas politike komplete fantasta ideo, ke ili estas ankaŭ elekteblaj. "Kapitalismo estas memmortigo", li iam diris en prelego. Tio ja sonas apokalipse, sed la problemo estas: La argumento ne estas facile refutebla.

Eble la vere miriga flanko de la marksema skolo ĉirkaŭ Kunkel kaj liaj amikoj estas: Ke ili, alie ol tio, kion ni en la pasintaj jardekoj kutimis vidi ĉe la pensistoj de la radikaleco, estas damne realismaj kaj raciaj. Li ne povas aprezi la kontraŭpolitikan sintenon de Occupy nek la rektan agadon de sengvidaj kontraŭhierarĥiaj movadoj, kiujn ekz-e la

proparolanto David Graeber regule proponas.

Tio estas fine unu el la ĉefaj kaŭzoj pro kiuj Occupy restis senefika. Modera reformo kaj radikala transformado por Kunkel ne estas kontraŭdiroj: "La alte sukcesaj tempoj de la prizorgoŝtato estis, lastanalize, akompataj de pli da radikaligo de laboristoj kaj studentoj ol la sekvanta erao de la novliberalismo, kiu malkuraĝigis la radikalulojn same kiel la reformistojn."

La stilo, sed ankaŭ la senemocia ironio kaj la faka scio igas al tiu nova radikala pensado produkti analizojn, al kiuj oni lastanalize ankaŭ kiel, ni diru: reformisma socialisto devas konsenti aŭ al kiuj oni almenaŭ ne povas nei fundamentan konvinkoforton. Ili estas portataj de la dubo, ke la maŝinaro simple ripareblas. Sed Kunkel kaj amikoj ne havas politikan strategion en pli strikta senco.

Tamen oni ne povas ekskludi, ke tiu pensado gajnos influon. La postkrizaj jaroj kondukis al tio, ke la egoisma ekonomio de la novliberalismo perdis diskutan potencon kaj ke novkejnismo orientita al la komuna prospero gajnis influon. La novaj radikaluloj ekdiskutas tie, kie tiu ne kontentigas. Ilia forto estas: Ili levas la demandojn, kiuj trudiĝas. Kaj ili estas perceptataj en grava publiko.

ALIĜU AL IKEK

Ĉu vi estas politika maldekstrulo kiu scipovas la internacian lingvon? Do, ni invitas vin fariĝi membro de nia klasbatalema organizajo. Tralegu nian Statuton. Membro devas akcepti la Statuton kaj pagi membrokotizon.

Membrokotizo egalas al UEA-kategorio MJ(-T) por la koncerna lando kaj jaro: Kotizaro aktuala. (Sensalajrulo, aŭ tiu, kies salajro aŭ pensio estas relative malalta, pagas nur duonkotizon.)

Membro rajtas voĉdoni ĉe Internaciaj Konferencoj de IKEK, kaj voĉdoni en antaŭ-konferenca baloto por elekti estraron. Membro ricevas *Internaciiston* senpage. Membro rajtas partopreni nian retan diskutejon.

Por fariĝi membro: Pagu membrokotizon. Informu la Membro-organizanton ke vi petas membrecon de IKEK, akceptas la Statuton kaj jam pagis membrokotizon (aŭ duonkotizon). Kotizo pagita post la 1-a de Oktobro validas por la venonta jaro.

Sendu ĉiujn detalojn: dato de pago, sumo pagita, pagmaniero, nomo kaj stratadreso, retpoŝtadreso, telefon-numero, Skajp-nomo, ktp. Vi povas sendi la necesajn informojn en retmesaĝo, aŭ uzi nian aliĝilon.

Kiel pagi al IKEK

Pagu al la konto de IKEK ĉe la Universala Esperanto-Asocio — UEA-konto kekx-g — kun aldono de 5% administra kosto:

- (a) per kreditkarto ĉe la retpaĝo de UEA.
- (b) per PayPal favore al la retadreso financoj@co.uea.org.

Pagante pere de UEA, nepre skribu ĉiujn necesajn klarigojn kun la pago.

Ekzemple:

"Pago-celo: IKEK (UEA-konto kekx-g). Membrokotizo 2016 pri S-ro Via Nomo."

"Pago-celo: IKEK (UEA-konto kekx-g). Donaco de S-rino Via Nomo."

"Pago-celo: IKEK (UEA-konto kekx-g). Abonkotizo por Internaciisto 2016 por S-ro Via Nomo."

MALLONGE PRI LA STATUTO - DE STANO KEABLE

La aktuala Statuto de IKEK konsistas el la originala statuto adoptita de la 10-a Internacia Konferenco, plus amendoj adoptitaj de la 15-a kaj 16-a Internaciaj Konferencoj.

Nur Internacia Konferenco de IKEK rajtas ŝanĝi la Statuton, per simpla plimulto (Ĉapitro 2-a, Artikolo 3). Inter konferencoj gvidas elektita estraro, konfirmata de konferenco. Estraro elektas postenulojn laŭbezone. Estraro kunvokas konferencojn.

IKEK fondiĝis je 1974, fare de membroj de la Komunista Partio de Portugalio kun subteno de sia partio laŭ kongresa rezolucio. Dum 14 jaroj ĝi funkciis sen ajna

statuto. La 10-a Internacia Konferenco de IKEK (Lisbono 1988) unuafoje adoptis Statuton.

Je 1998, la 12-a IK aprobis amendojn per aldono de detalplena Regularo — sed poste neniu kunmetis en dokumento la diversajn proponojn kaj amendojn.

Decidoj restis ne plenumitaj. Dokumentoj restis ne verkitaj, ĝis la 16-a IK (Ĉeĥio 2007) decidis: "... simpligi la formalan strukturon de la Kolektivo per forigo de la kaduka, neuzebla Regularo adoptita en 1998. Restas mallonga Statuto, ŝangebla per simpla konferenca plimulto ..."

AKTUALA STATUTO DE IKEK

LASTE AMENDITA JE 2008

La aktuala Statuto de IKEK konsistas el la originala statuto adoptita de la 10-a Internacia Konferenco, plus amendoj adoptitaj de la 15-a kaj 16-a Internaciaj Konferencoj.

ORIGINALA STATUTO ADOPTITA DE LA 10-A INTERNACIA KONFERENCO DE IKEK, LISBONO 1988:

Ĉapitro 1-a: Principoj

Artikolo 1: Internacia Komunista Esperantista Kolektivo (IKEK) celas: interrilatigi la komunistajn Esperantistojn.

Artikolo 2: Per la lingvo Esperanto, IKEK provas helpi al la internaciaj rilatoj de la laborista movado, precipe de la komunistaj partioj kaj aliaj klasbatalantaj partioj.

Artikolo 3: IKEK ne devas stari flanke de la grandaj problemoj de nia epoko: paco, socia progreso, ekologio, demokratio.

Artikolo 4: IKEK estas malferma al ĉiuj tendencoj de la laborista movado. La marksismo-leninismo, kiun parto el la IKEK-anoj rigardas deviga fundamento, estas debatebla por ĉiuj.

Artikolo 5: Gravas la komunaj interesoj de laboristaro por paca mondo, socialismo kaj komuna batalo por socialaj interesoj.

Artikolo 6: IKEK ne volas esti unubloka, sed dialektike evoluanta organizo.

Artikolo 7: La landaj KEK povas doni propran nacian statuton koheran kun la principoj de IKEK.

Ĉapitro 2-a: Strukturoj

Artikolo 1: Ĉiuj membroj* estas kunvokataj al la Internacia Konferenco (IK).

Artikolo 2: IK elektas la estraron**. Tiu ĉi konsistas almenaŭ el Prezidanto, Vicprezidanto(j), Sekretario, Kasisto, Redaktisto de Internaciisto. La elektitaj gekamaradoj estas reelekteblaj.

Artikolo 3: Nur IK rajtas ŝangi la statuton per simpla plimulto.

Modifoj kaj klarigoj:

*Membroj:

Decido de la 16-a IK (Ĉeĥio 2007) difinis membrecon kaj kotizaron:

- Membro estas tiu, kiu petas membrecon, akceptas la statuton kaj pagas membrotizon.
- Membrotizo egalas al UEA-kategorio MJ(-T) por la koncerna lando kaj jaro. Membro ricevas Internaciiston senpage.
- Abonotizo de Internaciisto egalas al membrotizo.

Laŭ decido de la estraro je 2007-11-30:

- Sensalajrulo, aŭ tiu, kies salajro aŭ pensio estas relative malalta, pagas nur duonkotizon (ĉu por membreco, ĉu por abono).

** Estraro kaj postenuloj:

Laŭ decido de la 15-a IK (Vilno 2005):

- Post elekto de estraro, la estraro elektas postenulojn.

Laŭ decido de la 16-a IK (Ĉeĥio 2007), konfirmata de la 17-a IK (Roterdamo 2008):

- Estraron elektas ne konferenco, sed tuta membraro, per antaŭ-konferenca baloto. Rezulton de estrara baloto agnoskas kaj konfirmas konferenco.

Kotizo ricevita post la 1-a de Oktobro validas por la venonta jaro.

IKEK Aliĝilo / Abonilo / Informilo

por fariĝi membro de IKEK, por aboni *Internaciiston*, por kontroli aŭ ŝanĝi kontakt-detalojn:

NE sendu la informojn al la IKEK-diskutgrupo!

PREFERE sendu la informojn per e-poŝto al du retadresoj:

arbuto@gmail.com (Alcino Alves, Membro-organizanto), kaj
keablestan@yahoo.co.uk. (Stano Keable, Mastrumanto de reta diskutgrupo)

ALTERNATIVE, se vi ne uzas retmesaĝojn, sendu plenumitan informilon per helikpoŝto al:
Alcino Ramos Alves, Rua Augusto Fernandes 66, 6160-410 Oleiros, Portugalio.

Forstreku tekstojn, kiujn vi ne bezonas.

NOMO:

Retadreso(j):

Mi ne volas esti membro de IKEK. Tial forprenu mian retadreson de la IKEK-diskutgrupo.

NOMO:

LANDO:

KOTIZO:

(Membrokotizo egalas al UEA-kategorio MJ(-T) por la koncerna lando kaj jaro.)

Mi akceptas la Statuton kaj petas/konfirmas membrecon de IKEK.

aŭ

Mi NE petas membrecon de IKEK, sed abonas *Internaciiston*.

Mi pagis al IKEK _____ (sumon)

Pag-metodo:

Pag-dato:

Plena Hejma/Poŝta Adreso
(por sendi *Internaciiston* aŭ korespondaĵojn):

Tel:

Retadreso(j):

Skype-nomo:

Stano Keable,
Prezidanto de IKEK
Mastrumanto de la IKEK-diskutgrupo kaj retpaĝaro
BCM Box 8932, Londono GB-WC1N 3XX, Britio.
keablestan@yahoo.co.uk Tel: +44 7817 379568 Skype-nomo: stan.keable
Retpaĝaro: www.ikek.org